

Leterujo, 2a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 581 1974.11.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni komencis perradian babiladon kun niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam diris, ke alvenis poŝtaĵoj el 19 landoj : Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Norvegio, Pollando, Svedio kaj Svislando.

A.- Hodiaŭ ni komencos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj salutante tiujn, kies kleteroj ne precize rilatas la temojn, kiujn ni poste pritraktos. En Brazilo, urbo *Santiago*, sinjoro *Valdelir José Gindri Perufo* nin mirinde bone aŭdas. Per Svisa Radio li havas regulan kontakton kun Esperanto.

Cl.- En Britio ni salutas gesinjorojn *Alice kaj Walter Peake* en *York*, kaj gesinjorojn *Najbaro* en *Keighley*. Tiuj lastaj preskaŭ semajnon post semajno raportas pri la aŭskultado de niaj radio-prelegoj. Ni havos la okazon citi kelkajn erojn el iliaj poŝkartoj, kiam ni alvenos al la temoj interlingvistika arkivejo CDELI, Kultura Centro Esperantista, mondanismo, la nuna lingvo-evoluo en la mondo, lingvaj demandoj. Sed unue ni daŭrigu nian salut-enkondukon.

A.- En Ĉeĥoslovakio ni salutas sinjoron *Jiri Patera* en *Most*.

Cl.- Kaj en Danlando sinjoron *Karen Hedegaard* en *Horsen*, kiu forgesis doni sian kompletan adreson. Ne imitu lin !

A.- En Francio ni salutas sinjoron *Yves Fromentoux* en *Vitré*, sinjoron *A. Legret* en *Vire*, sinjoron *Lemaire* en *Lyon*, sinjoron *Lentaigne* en *Montpellier*, sinjoron *Henri Masson* en *Courbevoie*.

Cl.- En Germanio okcidenta ni havas regulan aŭskultanton en doktoro *J. Kondo* en *Neuwied*.

A.- En *Barcelona*, Hispanio, la tuta familio *Prim* nin aŭskultas.

Cl.- En Hungario ni salutas sinjoron *Pál Felső* en *Pécs*, sinjoron *Sándor Termes* kaj sinjoron *Tollar Tibor* en *Budapeŝto*.

A.- En Islando niaj pensoj iras al sinjorino *Louise Oskarsdotlir* kaj sinjoro *Hallgrimur Samundsson* en *Gardahr*.

Cl.- Ni forlasu la nordon por la sudo. En Italio la Esperato-Grupo en *Sondrio* ricevu niajn salutojn.

A.- Denove al la nordo. En Finnlando sinjoro *Jalmar Vakkari* en *Inkeroinen* estas kontenta pri la diverseco de niaj radio-prelegoj.

Cl.- En Svedio sinjoro *Fritz Ström* en *Kumla* bedaŭras la mallongecon de niaj prelegoj. Samopinias la plimulto de niaj aŭskultantoj. Ankaŭ saluton al sinjoro *Erik Lundvall* en *Borlänge*, kiu registras niajn prelegojn kaj poste ilin reaŭdigas al la membroj de la loka klubo.

A.- En Svislando al sinjorino *Frieda Hiltbold* en *Corseaux* kaj al sinjoro *Daniel Mühlemann* en *Brugg* ni direktas amikan vivsignon.

Cl.- Pluraj aŭskultantoj diris sian intereson koncerne nian informadon pri la funkciado en la kadro de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds de interlingvistika dokumentejo nomata **Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale**. Ili estas sinjoro *D. B. Gregor* en *Northampton* kaj gesinjoroj *Najbaro* en *Keighley*, Britio, sinjoro *Jerzy Uspienski* en *Varsovio*, Pollando kaj sinjoro *Lucien Giloteaux* en *Croix*, Francio.

A.- Sinjoro *Giloteaux* atentigas nin pri alia grava arkivejo, kiu troviĝas en la publika biblioteko de la urbo *Kortrijk* aŭ *Courtrai*, Belgio. Temas pri la fondaĵo *Cesar Vanbiervliet*, en kiu estas nun registritaj pli ol 1'900 titoloj en esperanto. Sinjoro *Najbaro* estis tre interesata de la intervjuoj, kiujn ni faris kun doktoro *Tazio Carlevaro*, la prezidanto de CDELI. Ni diru, ke d-ro *Carlevaro* estas ege kapabla por prezidi interlingvistikan centron. Li estas eksterordinara poligloto, kiu flue parolas la 4 svisajn lingvojn : la germanan, la francan, la italan, kiu estas lia hejma lingvo, kaj la romanĉan. Krom tio li parolas kaj legas aliajn etnajn lingvojn, bone konas la klasikajn lingvojn, el kiuj li tradukas, kaj, kio estas ne tre ordinara afero, li estas praktikanto de la 4 plej gravaj planlingvoj : esperanto, ido, occidental kaj interlingua. En ĉiuj tiuj lingvoj li estas konata kiel verkisto. Ĉiujn li mirinde bele kaj fluege parolas.

Cl.- Oni povas kompreni, ke sub tia prezidado la interlingvistika dokumentejo CDELI rapide kreskis. Adeptoj el plej diversaj planlingvaj skoloj direktis al la biblioteko de La Chaux-de-Fonds siajn arkivaĵojn. Koncerne la neesperantan planlingvistikon CDELI estas tre verŝajne jam nun unu el la plej riĉaj dokumentejoj en la mondo.

A.- La sabaton 26-an de oktobro disvolviĝis en La Chaux-de-Fons la dua ĝenerala kunveno de la donacantoj de CDELI. Ili miris pri la jam atingitaĵoj. Tiuj kunsidoj okazas ĉiujn du jarojn. Antaŭ du jaroj la laboro efektiviĝis en la salono Edmond Privat en malfacilaj labor-cirkonstancoj, ĉar la saman lokon okupis aliaj bibliotek-deĵorantoj. Nun CDELI disponas pri propraj provizoraj lokoj : movegeblaj kompaktejoj, kien oni metas la dokumentojn, oficejon, kiu estas fakte la trezorejo de la biblioteko, subtementejton, kie stariĝas libro-vendejo interlingvistika.

Cl.- Sinjoro *Jerzy Uspienski* informiĝis, ĉu jam nun oni povas prunti materialon el CDELI. Ni respondos, ke la plej granda parto de tiu materialo neniam forlasos la bibliotekon La Chaux-de-Fonds. Ĝi konsistas el arkivoj, kiuj estas surloke konsulteblaj. La studentoj kaj serĉantoj ricevas la arkivojn, por kiuj ili havas intereson, kaj ili disponas pri la necesa laborloko en la legosalono de la biblioteko por trankvile konsulti la ricevitan materialon. Tiel studentino el Otawa, ekzemple, venis dek tagojn el Kanado por ekzameni la arkivojn, kiuj koncernas la provon enkonduki esperanton en Ligo de Nacioj en la jaroj 1920-1925. Ŝi diris, ke ŝi troviĝis antaŭ minejo de grava kaj nenie aliloke trovebla materialo.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj radio-aŭskultantoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!